

la naska fasko

Ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto


Numero tri
2008-07-02
Merkredo

Pasporto al la Tuta Mondo

Pasporto al la Tuta Mondo estas Esperanto-kurso farita de Esperanto-USA en formo de televid-stila dramo. Ĝin nun utiligas UCSD kaj aliaj lernejoj.

Studentoj sekvas la aventurojn de la familio Bonvolo kaj ties amikoj kaj konatoj. Sed notu: la familio Bonvolo ne estas ordinara familio. La patro estas antikva greka filozofa, kaj la patrino estas moderna dancistino. Kune kun la tri gefiloj (juĝisto, skulptisto, kaj atleto!) ĉio iras pli-malpli glate ĝis kiam alvenas juna ŝafisto—kune kun ŝafopere de la *Pasporta Servo*.

Hodiaŭ, je la 7-a vespere en la komuna salono, Lusi Harmon parolos al ni pri la kurso, kiun vi povas spekti en la lingvo-laboratorio.




Kalembura kadro

Ĉu vi sukcese divenis la hieraŭan enigmon? Ĝi estis... **"te-amo"**!

La hodiaŭa havas 7 literojn:

___ _ _ _ _ o



Butikumu malmultekoste

Ĉu vi forĝis ion aŭ volas aĉeti ion malmultekoste? Troviĝas vendejo nomita "Friends Resale Center" ĉe la Internacia Centro kiu situas malsupre de la kafejo kie multaj NASKanoj kafejumas dum la paŭzo.

La varoj estas uzitaj sed ili havas bonan staton. La mono gajnita estas uzata por stipendioj por studentoj de UCSD kiuj studas eksterlande, kaj por fremdlandaj studentoj kiuj studas ĉe UCSD.

Por pli da informo (bedaŭrinde nur en la angla) iru al

ucsdnews.ucsd.edu/thisweek/2005/apr/04_25_resale.asp

Simono
KEITH

El la kalendaro

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝos ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj restas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	hodiaŭ	ĵaŭdo	vendredo	sabato
matene	9 atm–12:20 ptm: klasoj	9 atm–12:20 ptm: klasoj	<i>Nacia Tago: neniuj klasoj!</i>	<i>libera</i>
post-tagmeze	2 ptm: ekskurseto al la glisilejo	1:45 ptm: ekskurso al la akvario <i>Birch</i>	<i>libera</i>	<i>libera</i>
vespere	7 ptm: Lusi parolas pri <i>Pasporto al la Tuta Mondo</i>	7 ptm: USEJ-aferoj kun Brandon	6 ptm: ekskurso al La-Jolla por vidi la fajraĵojn	<i>libera</i>

Ĉu organizo junulara havindas?

Mi volas diskuti tiun temon okaze de la relative alta numero de junuloj ĉi tie. En multaj landoj oni kreis junularajn esperantistajn organizojn, kiuj faras siajn proprajn kongresojn aŭ kunvenojn, varbas por Esperanto en la junulara medio de siaj landoj, kaj ĉefe helpas junajn esperantistojn kiuj volas renkonti samaĝanojn por diverti moĝose (**moderna, juna stile**). Dum jaroj ekzistis USEJ, Usona Esperantista Junularo, sed ĝi pli-malpli malaperis dum 2002. Antaŭe ekzistis JEN, Junularo Esperantista de Nordameriko. Ŝajnas al mi, ke tia organizo estas havinda, kaj do mi invitas tiujn, kiuj estas pli junaj ol pli-malpli 30 (aŭ tiuj kiuj estas pli maljunaj sed interesiĝas aŭ havas konsilon): **bonvolu veni al nia komuna salono morgaŭ je la 7-a vespere**. Mi esperas, ke ni povu diskuti tiun temon, kaj se ni elektos kelkajn provizorajn proponojn, ni poste povos diskuti kun junuloj, kiuj partoprenas en TAKE en Montrealo.

Do, jen kelkaj pensigaj demandoj:

- Kiel formala estu nova junulara organizo? Kun la interreto, ĉu ni ankoraŭ devas verki konstitucion, elekti oficirojn, kaj fari tiajn (foje necesajn) burokrataĵojn? Mi opinias, ke estus pli saĝa organiziĝi kiel neformala reto, aparte tuj post la naskiĝo de nova organizo.



- Kiajn aferojn faru la proponita organizo? Kiajn rimedojn ĝi kreu? Laŭ mi, gravaj rimedoj estus komuna blogo aŭ retejo, kaj komunaj varbiloj (glumarkoj, kajeroj, ktp). Sed ĝi ankaŭ povus kunvenigi junularajn kongresojn ktp.
- Ĉu nur usona reto aŭ nordamerika? Se ni organizas ĉefe per la reto, eble estas pli taŭga inkluzivi esperantistojn junajn de Kanado kaj Meksiko (aŭ eĉ Kubo). Neniu el tiuj landoj havas multe da junaj esperantistoj, do eble estos pli facile labori kune ol aparte. Parenteze, mi menciuj ke por ni esperantistoj la landlimoj ne estu sanktaj.

Do, bonvolu pripensi tiajn aferojn kaj venu al nia komuna salono je la 7-a, ĵaŭdon!

—Brandon SOWERS

Hodiaŭa ekskurs(et)o: la glisilejo



Post la tagmanĝo, **renkontiĝu je la 2-a antaŭ Asante**. Ni promenos proksimume dek minutojn por atingi la glisilejon de *Torrey Pines*, kiu situas ĵus apud ni.

La glisilejo (“glider port”) situas ĉe la rando de altaj marbordaj klifoj, de kie vi povas spekti glisilojn (aŭ eĉ flugi en ili!), aĉeti trinkaĵojn, kaj ĝui la vere belegan vidaĵon. De tie oni povas vidi surfistojn, ruliĝantajn ondojn, mejlojn da plaĝo, kaj la urbon de La Jolla.

Ni restos ĉe la glisilejo nur duonhoro (aŭ malpli) kaj revenos. Apude troviĝas longa ŝtuparego iranta malsupren al la plaĝo de *Black* (angle: *Black’s Beach*), tre ŝatata loko de kaj surfistoj kaj naturistoj (senvestemuloj). Ni ne iros tien hodiaŭ, sed kompreneble vi rajtas pluiri post la ekskurseto, se vi volas.

Kunportu fotilon, se vi havas. La suno brilos brule, do ne forgesu sunĉapelon kaj kontraŭsunan kremon!

Kiu loĝas kie?

122

Neal WILEY
Brandon SOWERS
Steven CYBULSKI
Simono KEITH

124

Helen FARAJI
Dori WHEELER
Ellen EDDY
Jody HURD

125

Sasha WADE
Kristen MCCARTNEY
Meja JUNA
Stelet’ KIM

126

Liĉjo MILLER
Hoss FIROOZNIJA
Amri WANDEL (dum la tria semajno)

127

Birke DOCKHORN
Bertilo WENNERGREN

221

Koto FARMER
Lusi HARMON
Indu THAPALIYA
Esther SCHOR
Mar CARDÉNAS

222

Vido GILLETT
Alain NEGADO
Mel HURD
Keneĉjo GOLDBERGO

